7-a JARO, N-o 359 LEIPZIG, 20. / 8. 1931

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

APERAS SEMAJNE | REDAKTEJO: 14, av. de Corbéra, Paris 12e. – GVIDANTO: E. Lanti. – SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO DE SAT: 23, rue Boyer, Paris 20e. – ADMINISTREJO: R. Lerĥner, Kolmstr. 1, Leipzig O 27 (Germanio). | SEMAJNE APERAS

KONGRESA PAROLADO

Laŭ la speciala peto de pluraj K-doj, kiuj partoprenis nian 11-an Kongreson, ni publikigas en „S-ulo" la sekvantan paroladon, kiun faris K-do E. Lanti en la Amsterdama Koncertejo okaze de festkunvenego aranĝita de Nederl. Federacio de Lab. Esp-istoj por saluti la SAT-kongreson, je la 1. aŭgusto vespere. Ĉi tiu parolado, same kiel la cetera parto de l'festprogramo, estis disaŭdigata per radio tra la mondo. – Red.

Estimataj Gekamaradoj!

Okaze de la XI-a Kongreso de *Sennacieca Asocio Tutmonda* estas por mi aparte interese memori, ke en ĉi tiu urbo naskiĝis, antaŭ tri jarcentoj, unu el la plej grandcerbaj homoj, unu el tiuj malmultaj, kiuj honoras la homan specon. Mi aludas pri Benedikto Spinoza, la senmorta aŭtoro de *Etiko*, la glora filozofo k moralisto, kiu samtempe estis ankaŭ manlaboristo, ĉar li laborakiris siajn vivrimedojn polurante lensojn por astronomaj lornoj; mi aludas pri la juda renegato, kiu staris ekster ĉiuj eklezioj k montriĝis kiel vera liberpensulo.

Kial memorigi pri tiu eminenta homo? Kian rilaton li havas kun esperanto k la SAT-Kongreso? eble vi demandas. Permesu do, ke mi tre koncize respondu al tiuj demandoj.

La filozofo-laboristo aŭ laboristo-filozofo – laŭ via prefero – esprimis siajn profundajn pensojn en *internacia* lingvo; latine ja aperis lia *Teologi-politika traktaĵo* k lia *Etiko*. Tiel havis Spinoza legantojn, se ne en la tuta mondo, almenaŭ en tuta Eŭropo.

Tia fakto estas pripensiga: jam do ekzistis k grandskale aplikiĝis internacia *helpa* lingvo antaŭ kelkaj jarcentoj. Kaj ni hodiaŭ povas konstati, ke la helpa rolo de la latino definitive likvidiĝis: nuntempe scienculoj k filozofoj ne plu esprimas sin per la lingvo de Cicerono k Cezaro. El tiu konstato mi konkludas, ke pure scienca k nure helpa lingvo ne estas vivkapabla k neniel povus solvi la problemon pri tutmonda interkompreniĝo. La latino mortis kun la forfalo de l'Romana Imperio; ĝi disaliiĝis en naciajn dialektojn k estus vana ĉia provo ĝin revivigi.



El la manifestacio tra Amsterdamo, okaze de la 11-a SAT-kongreso.

*

Treege aliiĝis la mondo, dekiam Kartezo, Lajbnic, Spinoza k. a. latine filozofis. La tekniko disvastiĝis tra la tuta mondo; ĉie stariĝis grandaj fabrikoj, ĉirkaŭ kiujn ariĝis amaso da laboristoj. La artefariteco jam profunde penetris en la vivon de l'popoloj; – ĝis tia grado, ke hodiaŭ stariĝas la demando: ĉu la homo fariĝos sklavo de l'maŝino? aŭ ĉu li sukcesos per prudenta raciigo k taŭga, celkonforma organizigo sklavigi la maŝinon al si? Mi havas la esperon, ke la dua demando estos jese respondata: la homo liberiĝos k sklavigos la maŝinon; lia elpensemo venkos ĉiujn naturajn fortojn.

Belan ekzemplon pri tio oni povas vidi en ĉi tiu lando; ĝi ja estas pli artefarita ol ĉiuj aliaj. La Nederlandanoj venkis la maron, devigante ĝin foriri el grandaj spacoj, en kiuj kulturite nun kreskas plej diversaj plantoj.

La artefariteco pli k pli sin trudas; kiu ne komprenas tion, tiu ne havas ĝustan percepton pri nia epoko. Cetere ne ankoraŭ montriĝis la genia poeto, kiu klarige kantus per impresaj versoj la himnon al la artefaremo. Sed mi ne dubas, ke tia homo naskiĝos; eble li jam vivas k nun eklernas esperanton en iu malproksima loko el Okcidento aŭ Oriento. Tia granda verkisto, pri kiu mi pensas, povas dece k trafe prikanti la novan epokon nur per la artefarita esperanto.

*

Dume nia lingvo almenaŭ vivas. Kiu dubas pri tio, tiu venu kiel gasto ĉeesti unu aŭ du kunsidojn de la kongreso morgaŭ malfermiĝonta. Estas antaŭvideble, ke pasiaj estos la debatoj, k tio plej bone pruvos la vivantecon de esperanto. Alia pruvo, ke vivas nia lingvo, estas la fakto, ke SAT-anoj troviĝas en ĉiuj civilizitaj mondpartoj. Al ĉi tiu kongreso ne povis veni K-doj el tre malproksimaj lokoj, tial ke nia Asocio konsistas ĉefe el malriĉaj homoj. Tamen skeptikuloj povos konstati, ke K-doj el 14 landoj kolektiĝis por interdiskuti siajn komuninteresajn aferojn.

*

Estos la XI-a fojo, ke simplaj laboristoj el plej diversaj landoj kunvenas k debatas sen la helpo de tradukistoj k interpretistoj. Kaj malgraŭ tio la gvidantoj de la laborista movado restas ankoraŭ nesciaj aŭ skeptikaj pri nia movado.

Sendube estas esceptoj, tre malmultaj, inter kiuj mi citu la nomon de homo, kiun vi eble konas persone, ĉar li estas via samurbano: mi aludas K-don Nathans, unu el la sekretarioj de *Internacia Federacio de la Transportlaboristoj.* En la jaro 1924 li ĉeestis kiel gasto la IV-an Kongreson de SAT, kiu okazis tiujare en Bruselo. Informcele li venis; li vidis, li aŭdis k venkis ... sian skeptikon. De tiu tempo K-do Nathans estas fervora adepto k praktikanto de nia lingvo.

*

Se estas eble per la orelo konvinkiĝi pri la taŭgeco k vivanteco de esperanto, ne estas tiom facile akiri klaran komprenon pri la rolo k signifo de artefarita, tutmonde uzebla lingvo. Ekzistas ja multaj esperantistoj, kiuj ne komprenas la esencon, la karakteron de la movado, kiun ili mem partoprenas. Se ili komprenus, ne okazus dum niaj kongresoj vanaj disputoj pri partiecaj aferoj. Por kelkiuj esperanto estas nur unu plia lingvo, kiu aldoniĝas al aliaj. Ili cetere provas vuali per filistraj argumentoj ĝian artefaritecon, k ne sukcesas kaŝi sian embarason ĉe la konstato, ke Marks, Kropotkin k Lenin ne estis esperantistoj. Ridinde! Neniu homo posedas la tutan sciencon, la ĝustan komprenon pri ĉiuj aferoj. Oni ne gloras eminentulon per spirita sklaviĝo al liaj mankoj aŭ eraroj...

*

La tasko de SAT estas meti esperanton je la servo de l'tutmonda proletaro. Kaj tio signifas, ke la laboristaj esperantistoj el ĉiuj tendencoj devas kunigi siajn fortojn por atingi, ke iliaj respektivaj organizoj alprenu, vastigu k aplikadu nian lingvon. Kaj tio estas atingebla, ne per trudo de iu ajn partia ortodokso, sed per la impona forto de multanara organizo konsistanta el lingve kapablaj k sufiĉe kleraj esperantistoj. Meti esperanton je la servo de l'proletaro, tio ne signifas simie imiti la taktikon, kiun oni kutimas apliki en sia sindikato aŭ partio. La taskoj tie ne estas la samaj kiel en esperantista organizo.

La laboristaj gvidantoj atentos la mondlingvan aferon, nur kiam sufiĉe granda nombro da esperantistoj troviĝos en ĉiuj organizoj; kiam ekzistos en esperanto abunda k valora literaturo laboristtendenca. La venko venos de *malsupre*, per la premo de la vicanoj. Granda la tasko; malproksima la celo...

*

Tiuj ankaŭ ne komprenas la ĝustan signifon de esperanto, kiuj ne povas prezenti al si novajn formojn de organizado per sistema ignoro al la landlimoj. Inter esperantistoj lingvaj baroj ja ne ekzistas k el tiu fakto racie pensantaj homoj devas tiri ĉiujn logikajn konsekvencojn. En la SAT-kongresoj ne estas nacioj reprezentataj. Ĉiuj SAT-anoj konsistigas *sennaciecan* popolon, kiu estas kvazaŭ la embrio de la estonta socio. Tio estas grava, tre grava fakto, kies signifon ne ĉiu komprenas. Tamen jam ekzistas atentinda nombro da K-doj, kiuj klare perceptas la karakterizaĵojn, la tendencon de nia epoko; kiuj konscias plene pri la granda rolo, kiun ludas la artefaremo en la historia procezo de l'homaro, k tute speciale pri la rolo, kiun povas ludi esperanto en tiu procezo.

Kion plenlume vidas la konsciaj SAT-anoj, tion jam sendube intuiciis la aŭtoro de esperanto mem, antaŭ 25 jaroj. Ĉe la malfermo de la 1-a Kongreso de esperanto d-ro Zamenhof ja diris: „... hodiaŭ inter la gastamaj muroj de Bulonjo-ĉe-Maro kunvenis ne Francoj kun Angloj, ne Rusoj kun Poloj, sed homoj kun homoj. ..."

Hodiaŭ en Amsterdamo mi parafraze diru: Ĉe la XI-a Kongreso de SAT ne kunvenos diversnacianoj, sed proletoj, samklasanoj, unuigitaj per komuna lingvo, per samaj aspiroj k kiuj, laŭ diversaj vojoj, per malsamaj rimedoj, celas starigi senekspluatan, senklasan, sennacian sociordon sur la tuta terglobo.

GVIDREZOLUCIO

La XI-a Kongreso de SAT

1) Diskutinte dum 6 laborkunsidoj pri la nuna krizo en la laborista esperantista movado k pri diversaj organizaj aferoj;

2) Aŭdinte dum kvar kunsidoj kun vere tre miriga pacienco k toleremo la daŭran k zorge organizitan obstrukcon fare de aro da partifanatikuloj, kiu per sistemaj interrompoj k nedirindaj insultoj k provokaj rimedoj penadis, sed sensukcese, trudi sian diktatorecon al la Kongreso;

3) Konstatinte, ke tia konduto de laboristaj esperantistoj povas nur rezulti de blinda partia fanatiko k miskompreno pri la taskoj de kultura, kleriga, informa organizo, kia laŭstatute estas SAT;

4) Aŭdinte, diskutinte k akceptinte per 105 voĉoj por la Komitato, 6 kontraŭ k 6 sindetenoj la raportaron prezentitan de la Plenum-Komitato, deklaras sian plenan aprobon al tiu gvidinstanco por la laboro farita dum la jaro k petas, ke ĝi daŭrigu la gvidadon dum la venonta jaro;

5) Bedaŭras tamen la fakton, ke malplimulto da anoj ribelis kontraŭ nia kongresordo k forlasis la kongresejon ĉe la konstato, ke ĝi ne havis ian ajn ŝancon kapti en siajn partiecajn manojn la gvidadon de la Asocio;

6) La tuta Kongresanaro precipe bedaŭras pro la fakto, ke la skismo, fakte ekzistanta en nia movado jam de unu jaro, disigas nin de niaj amikoj en Sovetio;

7) Gardas tamen la esperon, ke tia stato ne daŭros dum tre longa tempo, k ke baldaŭ reebliĝos al la Sovetiaj Gek-doj aliĝi al SAT k havigi al si ĝiajn eldonaĵojn;

8) La Kongresanaro ne povas konsenti pri la klarigoj faritaj de CK de SEU pri la kaŭzoj de la reteno de granda sumo da mono ŝuldata al SAT;

9) Malgraŭ tiuj konstatoj, la tuta Kongresanaro deklaras, ke ĝi restas preta kiel antaŭe batali por malebligi, ke kapitalistaj landoj ataku Sovetion k malebligu, ke la nuna grandioza k ĉiel subteninda provo pri konstruado de socialismo sur unu sesono de l' mondo estu sukcesa;

10) Alvokas la SAT-anaron streĉi ĉiujn fortojn por forigi la breĉon, daŭrigi la praktikan laboron k firmpaŝe iri antaŭen al nia celo: meti esperanton je la servo de la tutmonda laboristaro.

Ĉi tiu Rezolucio estas akceptita en la lasta laborkunsido de la Kongreso (5. aŭg. vespere) per 79 voĉoj kontraŭ 1 ĉe 7 sindetenoj.

JACK LONDON
en esperanto:
LA FERA KALKANUMO
Tradukis
G. SAVILLE
368 paĝoj
Form. 12×18 cm
Prezo:
broŝ. 2.60 mk. g.
bind. 3.50 mk. g.
Mendu ĉe Sidejo de SAT: 23, rue Boyer, Paris XX, aŭ: Administrejo Leipzig O 27

Letero de Sako (Sacco) el la malliberejo (skribita al lia amikino).

La 23-an de aŭgusto estas la kvara datreveno de la juĝista krimo, per kiu viktime falis Sako k Vanceti, la du K-doj elturmentitaj dum sep jaroj en usona karcero, antaŭ ol ili estis ekzekutataj sur la elektra seĝo. Tago de honto k malhonorego en la homara historio, memoro alarmvekanta niajn ribelajn sentojn kontraŭ la maljustega nuna sociordo!

Ni presigas ĉi tie unu el la simplaj k kortuŝaj leteroj, kiujn sendis Sako el la karcera izolo en la eksteran mondon. *Red.*

„Kara amikino Ĵak!

„Ĉiuvespere, kiam oni forprenas la lumigilon, mi promenas longtempe k mi vere ne scias, kiom da horoj mi ĉirkaŭkuras, ĉar mi forgesas ofte iri por dormi. Mi iras, iras senĉese k nombras 1, 2, 3, 4 paŝojn, returnas min k nombras denove unu-du-tri-kvar k tiel ĉiam plu. Dum tiu tempo mia kapo estas plena de fantazioj. Miaj plej belaj rememoroj maldormiĝas, kiam mi tiel iradas k meditas. Kelkfoje mi haltas ĉe la fenestro de mia ĉelo k tra la malgajaj kradoj mi vidas la naturon dum la krepusko k la stelojn sur la bela blua ĉielo. Lastan nokton la steloj estis pli lumantaj k la ĉielo estis pli blua ol iam. Kiam mi ekvidis tion, mi memoris pri la okazintaĵoj el mia junaĝo k mi intencis, kiam mateniĝos, skribi al mia kara amikino ĉi tiujn pensojn.

„La floroj, kiujn vi sendis al mi dum la antaŭa semajno, vekis miajn junaĝajn memorojn. Antaŭ dekses jaroj, dum la aŭtuno, mi vidis lastfoje la vinberejon de mia patro. Ĉiuaŭtune, kiam la rikolto estis preta, mi devis gardi eĉ nokte, ĉar proksime ĉirkaŭ nia vinberĝardeno estis grandaj herbejoj, kie multaj bestoj sin paŝtis. Plej ofte mi dormis tie, por gardi la brutojn. La malgranda urbo Toremagiore ne estas malproksima de tiu loko. Matene k vespere mi iris tien k alportis du grandajn korbojn plenajn de legomo k fruktaro, k grandan bukedon por mia kara malriĉa patrino. La loko, kie mi dormis, estis malgranda veturilejo konstruita de mia patro, frato k mi. Ĉirkaŭ la veturilejo kreskis multaj plantoj k floroj, sed ne kreskis ruĝaj rozoj. Estis tre malfacile trovi belajn ruĝajn rozojn k mi amegas ilin. Proksime de nia vinberejo ni posedis grandan kampon k mi plantis legomon. Matene, pli frue ol la suno leviĝis, k vespere post la sunsubiro, mi iris aspergi ĉiujn florojn, legomojn k fruktarbetojn. Akurate, kiam la suno leviĝis, mi finis k tiam mi saltis sur la putomuron por vidi la grandiozan sunon brilantan; mi ne scias kiel longe mi restis por rigardi ĉi tiun belegan vidaĵon. Se mi estus poeto, mi scius priskribi la ruĝajn radiojn de l' kara suno, la briletantan bluan ĉielon, la bonodoron de l'floroj k la kantadon de la birdoj. Estis feliĉego.

„Tiam, post ĉi tiu ĝojego mi komencis ree labori, kantis unu el miaj plej belaj kantoj k dum mia kantado mi plenigis la korbon per fruktoj k kolektis florojn, formis ilin je bukedo. En la mezon de l'bukedo mi metis belan ruĝan rozon, kiun mi alportis el la malproksimo – unu el la ruĝaj rozoj, kiujn mi ĉiam serĉis k kiujn mi tiel volonte emis eltrovi – la veran ruĝan rozon.“

Ĉu homo, kiu skribis tian leteron, povis esti fihomo? – Ne, neniam! Sed tiuj, kiuj lin mortigaĉis!

Laŭ „Nia kalendaro“ (Viena popol-librejo)
trad. 17 117.

LA FONTO DE SENLABORECO (Daŭrigo. Vd. antaŭan n-on.)

El **Britio**, la forpelado de l'kampuloj el iliaj bienoj estas konata iom pli ĝenerale per la priskribo de *Marks*. La plej konata ekzemplo estas tiu de l'almozdonema *dukino de Sezerlend* (Sutherland), kiu donis grandajn sumojn por liberigo de l'sklavoj; samtempe ŝi forpeligis 15000 kampulojn k uzis ties teron por pli profitodona ŝafbredado. Tiuj 15000 kampuloj migris, serĉante laboron, en la urbojn k estiĝis salajraj sklavoj de l'juna industrikapitalismo. Kiel ili, multaj aliaj samsortuloj migris en la urbojn.

Jam tiu pli konata ekzemplo supozigas nin, ke en Britio ekzistas granda terpropraĵo. Fakte, en Anglio k Kimrio, 4000 homoj posedas 50,5 elcentojn de l'tuta tero, dum pliaj 35000 „malgrandaj“ terposedantoj okupas plian kvaronon da ĝi.

Ĉu tiu granda terpropraĵo efikas la samajn rezultojn kiel en Germanio?

Ĝis la jaro 1914, Anglio k Kimrio estis la plej eminenta industria lando de l'mondo. De 1861 ĝis 1921, ĝia loĝantaro kreskis de 20 milionoj da homoj ĝis 37,9 milionoj, do, preskaŭ ĝis la duoblo. Sed, la urba loĝantaro kreskis de 11 milionoj ĝis 30 milionoj; dume, la kampara loĝantaro malkreskis de 9 al 7,9 milionoj. La saman tendencon montras la elcentaj ciferoj pri la okupado de l'homoj. En la jaro 1831, la rilato de l'okupitoj inter terkulturo k urbaj profesioj estis: 31,5 elcentoj da terkulturistoj, 68,5 elcentoj da urbaj profesiuloj. Ĝis la jaro 1921 tiuj ciferoj ŝanĝiĝis je 6,5 k 93,5 elcentoj, do grandega redukto de l'terkultura loĝantaro. En Skotlando okazis simila evoluo.

El tiuj ciferoj rezultas: ankaŭ en Britio ekzistas elmigrado k migrado en la urbojn. Fakte, Britio estis k estas lando kun ampleksa elmigrado. Oni taksas la nombron de l'elmigrintoj de 1815 ĝis 1880 je 9250000 da homoj. La duono el tiuj venis el Anglio k Kimrio. La alia duono venis ĉefe el Irlando; tie la britaj grand-farmistoj forpelis la indiĝenan loĝantaron: „Kaj jurapliko k malsatado efikis, ke Irlando havas nun nur la duonon de sia loĝantaro kiel en la jaro 1840.“

„Pli ol la duono de l'elmigrintoj estis potage salajrataj laboristoj“; tio signifas: plejparte ili venis de l'kamparo. La supre citita evoluado de l' loĝantaro ja same pruvas tion. Por Anglio k Kimrio, K-do *J. Ramze* (Ramsay) kalkulas per tre detala esploro (komparu anglalingvan „ISK“ n-o 5, de 2-a kvaronjaro 1930) la nombron da formigrintoj el kamparo dum la jaroj 1881 ĝis 1921 je 2,7 milionoj minimume; 1,4 milionoj el ili migris en transmarajn landojn, dum 1,3 milionoj migris en la urbojn. Fakte, tiu kalkulo estas tre singardema, ĉar la pluso de l'naskiĝoj estas neatentita. Sed ĉi tiu estas sur la kamparo pli granda ol en la urboj.

Ramze ankaŭ vidigas nin, ke la formigrado el la distriktoj de l'granda terpropraĵo estas pli intensa ol el la aliaj distriktoj. La graflandoj (counties), en kiuj pli ol 55,5 elcentoj de l'tero apartenas al granda terpropraĵo, havas la plej maldensan loĝantaron. Tamen ilia loĝantaro malgrandiĝis de 1881 ĝis 1921 je 8 el cento, dum en la pli dense loĝataj graflandoj kun elcenta parto de l'granda terpropraĵo ĝis 45,5 elcentoj la loĝantaro restis la sama.

LITERATURO:

anglalingva:

Nineteenth Abstract of Labours Statistic. Londono 1928.

„ISK“ n-o 1, 1-a kvaronjaro 1929.

„ISK“ n-o 5, 2-a kvaronjaro 1930.

Graham Peac's Land-Map.

5.

Ĝis fino de l'pasinta jarcento, la elmigrintoj sin turnis ĉefe al Usono. Sed hodiaŭ, Usono estas jam industria lando k lando dependa de eksporto, en kiu ne ekzistas „neokupita“ tero por koloniuloj. Kie la tero efektive ne estas okupata, tie ĝi estas barita per la hipotekoj de l'estintaj posedantoj, kiuj bankrotis pro la agrara krizo.

Sed la industriaj ŝtatoj posedas koloniojn en Afriko, Azio k Aŭstralio. Kiaj estas la cirkonstancoj en ili?

El la kolonioj, kiujn posedis Germanio ĝis la mondmilito, **Sudokcidenta Afriko** estis nomita kolonio por ger-

manaj elmigrantoj. Ĉu la kamplaboristo aŭ juna kampulo sen tero povis elmigri tien k okupi teron sufiĉan por gajni siajn vivrimedojn? Tute ne! Ankaŭ tie, la plej valora lando, proksimume triono de l'tuta tero, estis okupita de 8 teraj kompanioj jam mallonge post la ŝtata okupo de l'lando. La sola laboro de tiuj kompanioj estis, ke ili vendis la rajton, uzi la teron. Ĉar la indiĝenoj, hotentotoj k hereroj, insistis pri sia rajto paŝti sian brutaron ĉie, ekestis milito; la indiĝenoj malvenkis, kelkaj mil homoj mortis pro la profito de l'kompanioj k la eŭropa „kulturo" povis disvastiĝi.

Tiaj teraj kompanioj estas karakterizaj por tuta **Afriko**, ĉu por la estintaj kolonioj germanaj Sudokcidenta Afriko, Orienta Afriko, Kameruno, ĉu por la britaj kolonioj Kaplando, Rodezio, Nigerio k Kenja, ĉu por la franca Gvineo, Dahomio k Madagaskaro, ĉu por la belga Kongo aŭ ĉu por la portugala Mocambiko. Sed pro la maldensa loĝantaro ne estas eble, efike bari la teron por la indiĝenoj. Pro tio oni pelas ilin al deviga laboro por ŝtato aŭ por privataj kompanioj. Pri tio ja raportis K-do 15700 en n-o 333-334 de „S-ulo". En Kaplando, oni malpermesas al indiĝenoj formigri el iliaj domiciloj sen ŝtata permeso, por havigi al bienuloj k minejoj malmultekostajn laboristojn.

Ni vidas, eĉ en tiuj ekonomie neevoluintaj regionoj ekzistas, malgraŭ la grandega amplekso de l'nekulturita tero, granda terpropraĵo. Ĉar, pro la tro maldensa loĝantaro, la posedantoj de l'tero ne povas efektivigi ekonomian premon kiel en industriaj landoj, ili devigas perforte la indiĝenojn, labori por ilia profito.

LITERATURO:

esperanta:

„S-ulo" n-o 333 k n-o 334, februaro 1931.

„Proletara gazet-servo esperanta" de 9. 5. 1928.

germanlingva:

Damaŝke: „La reformo de l'terrajto". Jena 1922.

„ISK" n-o 11, novembro 1928.

Hindio, la plej grava kolonio de Britio, estas malnova, dense loĝata teritorio kulturita.

En Hindio hodiaŭ ekzistas relative granda industrio. Inkluzive la laboristojn en la plantejoj por teo, Hindio havas industrian loĝantaron de 33 milionoj da homoj.

Ĉi tiuj laboristoj vivas sub la plej mizeregaj kondiĉoj. La meza jara enspezo po loĝanto estas en Hindio 10-15 dolaroj, sed en Britio 490 dolaroj. (La *Sejmen* [Simon]-raporto ja citas sumon de 40 dolaroj, sed ĉi tiu sumo estas taksita tro alte!) La plej bone pagataj laboristoj, la teksistoj en Bombe, ricevas 13,5 dolarojn monate, ĉe dekduhora labortempo. Tiu salajro apenaŭ sufiĉas por vegetigi familion de 4-5 homoj ĉe la simplegaj hindaj viv-kondiĉoj. Ŝpinistoj ricevas en Bombe 9,5 ĝis 11,2 dolarojn monate, en Madras 5,6-6,3. Nekvalifikitaj laboristoj gajnas nur 4,8 dolarojn, virinoj eĉ nur 3,2 dolarojn monate. La nekvalifikitaj laboristoj de la Bengal- k Nagpur-fervojo ricevas 3,9 dolarojn monate. — La duono de l'laboristoj malsatadas. La loĝejoj estas mizeregaj; „pro la granda malriĉo multegaj proletoj (en Bombe) dormas dum nokto sur la stratoj k publikaj placoj." Por ne perdi la laboron, multaj virinoj eĉ naskas en fabriko; aliel, ili estus devigataj, subaĉeti la inspektoron por ricevi ree laboron.

Ĉi tiu terurega ekspluatado certe nur estas ebla, ĉar ekzistas grandega rezerv-armeo.

Pri tiu lasta *Manabendra Nat Roj* raportas: El la 208 milionoj da terkulturistoj en Hindio estas:

41 milionoj kamplaboristoj sen tero;
137 milionoj malgrandaj farmistoj, kies tero estas tro malgranda, por nutri la farmiston;
30 milionoj mezaj farmistoj, kies tero sufiĉas, por ebligi sufiĉe favorajn viv-kondiĉojn.

La nombro de l'malgrandaj farmistoj malplimultiĝas iom post iom pro troŝuldiĝo. De 1910 ĝis 1920, la nombro de l'kamp-laboristoj pligrandiĝis je 60 elcentoj. Ĉar ne estas eble okupi ĉiujn kamp-laboristojn en terkulturo, tiuj migras tra la lando serĉante laboron k pligrandigas la rezerv-armeon por la hinda industrio.

H. N. Brelsford (Brailsford) rakontas pri vizito en hinda vilaĝo: „Homo ekstaris . . . . Li ne farmis teron, sed laboris kiel tagsalajrulo ĉe fervojo por 6 *anas* (= 2 pencoj) tage; tio signifas dekdu labor-horojn sen interrompo por manĝaĵo. . . . Mi povis konstati, ke la vilaĝanoj enviis lin. La kutima salajro por kamp-laboristoj estas 1-1,5 cendoj, k la vilaĝanoj asertis unuanime, ke la kamp-laboristoj havas pli bonajn viv-kondiĉojn ol la farmistoj."

„Ĉiu vilaĝano estas troŝarĝata de ŝuldoj . . . . Preskaŭ ĉie la procentaĵo estis la sama de 37,5 el cento. Fakte, la terkulturistoj parolis preskaŭ sen interrompo pri siaj ŝuldoj ĉie, kien mi venis la sekvintan tagon. . . . Tiu vilaĝo vivis k agis k laboris k ludis en reto de senfinaj ŝuldoj. . . . Sed la ĉefa fonto de l'ŝuldoj estis la rento de l'*Zemindar.*"

La Zemindar, tio estas la grandfarmisto. Li estas nomata farmisto; ĉar, oficiale, la tero estas propraĵo de l'ŝtato. Sed fakte li estas la posedanto de l'tero. Li ja povas uzi la teron laŭ sia deziro, se li nur pagas la terimposton; sed la multoblon de l'imposto li elpremas el la terkulturistoj.

El la ĉi-supra tabelo ni vidas, ke el la 208 milionoj da terkulturistoj 178 milionoj, t.e. 85,6 elcentoj, ne havas sufiĉan teron. Ekzistas ja pliaj 16 milionoj da homoj, al kiuj la terkulturo donas vivrimedojn; sed el ili nur 7 milionoj da bredistoj gajnas siajn vivrimedojn per propra laboro. Pliaj 540 000 el tiuj 16 milionoj estas la idoj de l'estintaj feŭduloj, la nuna terposedanta nobelaro, kiu havas intereson por la brita regado. Same la *zemindaroj,* la klaso de l'grandaj farmistoj riĉaj k de l'impostistoj de l'brita registaro. Estas pli ol 8 milionoj da homoj. Ili dependas de la brita registaro; ĉi tiu ja estas la oficiala posedanto, la plej granda posedanto de l'tero en Hindio. Post konkero de Hindio ĝi havigis al si la propraĵan rajton super la tero, parte perforte, parte trompante. Posedanto de l'tero, ĝi farmdonas ĉi tiun al grandaj farmistoj, la *zemindari*-sistemo, aŭ senpere al la terkulturistoj, la *riotvari* (ryotwari)-sistemo.

SEN LABORO

Ĥ. M. ĤRIMA

3.

Senlaboraj ni estas . . . Ve, jam
senlaboraj!
Kaj inkube nin ungas la splen' . . .
Ni malsatas, abundas la gren'!
Kamaradoj, vi aŭdu ĉi krion doloran!

Milionoj ni estas tra tuta la tero,
kun ni vivon malbenas idar' —
jun-viktimoj de la kapital' —,
de mizero mordataj k frosta vetero.

La estonton malluma nur vidas
okuloj . . .
Ni petadas pri ia labor' . . .
Ĉio vana. . . La lasta obol'
fordegelis, kiel en printempo
neĝbuloj . . .

Forpelite el domoj ni lacaj piedas . . .
kaj ni scias, ke fore en nord'
konstruata nun estas nov-mond',
pri triumfo kiesa kun firmo ni kredas!

Kaj ni scias, ke tie neniu mizeras,
nek restadas fratar' sen labor',
ĉar posedas ja ĉion popol'
k neniu sklav' estas de oro infera.

Vagas . . . Vagas ni ĉirkaŭ palacoj,
kasteloj . . .
kaj influe ni vokas en ĥor':
„Ekribelu, premata popol'!
Apartenas la mondo al ni sub ĉielo!"

Ni vagadas . . . pliiĝas en ĉiu
sekundo . . .
Manoj premas fosilojn de ŝtal' . . .
„Kamaradoj! por la kapital'
ĉiuj helpu, ke fosu tombegon ni nun
do! . . ."

Pri la **zemindari-sistemo** Brelsford rakontas: „En ĉi tiu vilaĝo la farmmono varias inter 3,5 ĝis 10,5 dolaroj. La kostoj por la terkulturado sumiĝas ... je 8 ĝis 15 dolaroj. En tiuj mi ne enkalkulis ion por la bubaloj (bovoj), la sterko k la laboriloj, ankaŭ ne la viv-kostojn de l'farmisto dum la tri senlaboraj monatoj de l'jaro. La gajno el la rikolto varias inter 5 ĝis 8 dolaroj .... rezulto .... Se la terkulturisto pagas la farm-monon, li malsatos; se li decidas resti vivonta, li riskas forpelon, aŭ li devas peti ree helpon de pruntedonanto." Ankaŭ Roj raportas: „Dekonon de l'terkulturistoj normale estas malsatmortanta."

Ĉe la **riotvari-sistemo**, la terkulturisto devas fordoni tuj post la rikolto ĝis 20 elcentoj de sia rikoltaĵo per kontanta mono. Do, li estas devigata vendi siajn produktojn tuj post la rikolto; tio signifas, vendi por ĉia prezo. Pro tiu kaŭzo la terkulturistoj preferas la industriajn plantojn pli facile vendeblajn. Sed pro tio ili ne produktas sufiĉe da nutraĵoj por si mem k devas aĉeti tiujn ĉe vendistoj por uzurprezoj.

Fruktedona tero, favora klimato, sed cent milionoj da homoj malsatas, triono de l'loĝantaro. Ĉar la tero estas propraĵo de fremda registaro k de malgranda posedanta klaso indiĝena.

Pri **Javo** (Nederlanda Hindio) *Abdul Sukur* raportis dum la kongreso kontraŭ-imperiista en 1929 similajn faktojn. La mond-vojaĝanto *Kolin Ros* konfirmas tion iagrade.

Ankaŭ el **Hindoĉinio** *Rene Bertole* raportas pri „la neeblo eĉ nur vegeti kiel terkulturistoj" k planteja laboro sub teruraj kondiĉoj.

Ni do vidas, ke en la kolonioj la cirkonstancoj laŭŝajne ja estas tre diferencaj de tiuj en la industriaj landoj; tamen ili estas fundamente la samaj. Ankaŭ ili havas rezerv-armeon; kompreneble, ĉi tiu venas de l'kamparo, ĉar nur en kelkaj el ili ekzistas industrio k nur de mallonga tempo. La granda terpropraĵo regas en ili preskaŭ senlime.

LITERATURO:

germanlingva:

Manabendra Nat Roj: „Hindio".

Ŝrader-Furtvengler: „La laboranta Hindio".

Jafer Hasan: „La malriĉo de Hindio". Hajdelbergo 1931.

H. N. Brelsford en „la germana ekonomiisto" n-o 10, 1930.

„Frankfurta Gazeto" n-o 550, 1929.

Kolin Ros: „Hodiaŭ en Hindio". Lajpcigo 1930.

anglalingva:

Sejmen (Simon)-raporto, vol. I. Londono 1931.

„ISK" n-o 9, 2-a kvaronjaro 1931.

Indian-Jear-Book 1929.

esperanta: „ISK" n-o 10, aprilo-junio 1931.

(Daŭrigota.) *16 900.*

TAGOJ EL MIA VIVO

Al vi, ora revo de mia vivo; al vi, eterna sopiro de mia koro; al vi, virino, amo mia ... al vi, per mano tremanta k koro disŝirita, mi dediĉas, kiel memoron pri feliĉa forpasinta tempo, ĉi tiujn humilajn liniojn, kiujn certe neniam legos viaj okuloj, kiuj ankoraŭ nun min lumigas ... kaj neniam vi legos ĉi tion, ĉar de ĉi tie al vi staras unu mondo, la sama mondo, kiu stariĝis inter ni ambaŭ ... unu mondo je diferencoj, je baroj, je kontraŭstaroj .. ĉu vi, virino, virino amata, memoras ankoraŭ pri tiuj feliĉaj tempoj kiam ni nesciante, ke inter la homoj povus ekzisti aliaj diferencoj ol tiuj de la inteligento k boneco, ni ekrigardis reciproke en niajn okulojn? Ĉu vi memoras? ... Forpasis de tiam 5 jaroj — unu eterneco. — Ni ambaŭ estis junaj, tre junaj: neniu el ni havis ankoraŭ pli ol 13 jarojn ... sed kiel ni nin sentis altirataj unu al la alia! ... kiel ni nin amis reciproke, kvankam ĉiam de malproksime ... Estis niaj okuloj, kiuj parolis, kiuj elmontris, kion la buŝo ne povis ... estis io grandioza nia amo ... estis mia unua k unika amo. ... Mi skriboficadis apud via loĝejo, k niaj fenestroj k galerioj estas atestantoj pri niaj mutaj konfidencaj amparoloj ... Tiel pasis du jaroj — la du jaroj plej feliĉaj el mia vivo. — Ĉu vi ankoraŭ memoras, aŭ vi jam sukcesis forgesi tiun reveman junulon, kiu tiom vin amis, kiu ĉion vidadis per viaj okuloj ... tiuj grandaj belaj okuloj? ...

Oni nin malkunigis ... estis atendeble ... Kio estis mi, se ne nur simpla proleto ... Kaj vi, mi ne scias, sed vi estis ĉe pli alta socisfero ... sed kion scias la amo pri ĉi tio? Ĉu ne la amo estas blinda, k blinde k tutkore mi vin amis revante pri farota nesto nia, feliĉa, harmonia? ... Sed, ankaŭ, kion scias ili pri ĉi tio, se ili ne konas la amon, ĉar per siaj interkonsentoj k antaŭjuĝoj ili ĝin makulas ... ?

Oni nin malkunigis ... vi estis ĉe alia socisfero k tio estis nia granda malfeliĉo ... la mondo, kiu stariĝis inter ni! Certe oni internigis al vi la ideon pri la klasdiferencoj — la abomenindaj klasdiferencoj —, konsciigis vin pri via ĉirkaŭo, medio. Kaj rilate al vi, mi ne scias, sed laŭŝajne influis pli super vi la mondo, kiun oni pentris antaŭ viaj okuloj, ol tiu, kiun plename mi al vi prezentis, ĉar iam, ho ve! de longe ne plu mi vin vidis ... Kiom mi suferis, sed multe pli, kiam finfine renkontante vin, plenĝoje mi aliris al vi k vi ŝajnigis ne koni min ... Ho, estis terure! mi restis kiel neniigita, la mondo k ĉio formalaperis de miaj piedoj. ...

Adiaŭ, belaj iluzieroj
El amo mortinta naskiĝantaj,
Jam ne revenos al mi la vantaj
Dolĉaj kantoj de ĉarmaj esperoj ...

Kaj la mondon k ĉion mi rigardis indiferente ... mi estis perdinta kion pleje mi estis amanta. Jam estis al mi same vivi kiel ne vivi: kian altiraĵon nun doni al la vivo? ... Kaj seniluziiĝinta, kun la koro dispecigita, mi serĉis la morton, sed, antaŭ ol morti, io min lumigis ... „Kion mi solvas per mia formalapero? — Mian saviĝon, jes, sed ne tiun de l'homaro ... Kiom da homoj ne suferas kiel mi pro la sama kaŭzo k ankaŭ pro multaj aliaj, k nur pro la malordigo de l'homara socio? ... Kiom da vivoj, kiel la mian, ne disŝiris certe tiu terura fantomo — la detruendaj sociklasaj diferencoj? ... Ho, terura fantomo, kiom da malfeliĉoj vi semadis k semadas ĉie! ... Kiom da viktimoj estas viaj! ... Kiom da homoj naskitaj por kunvivadi, por esti kune feliĉaj, vi, per via kruelega manaĉo malkunigis kreante per tio eternan malfeliĉon! ... Ha, se vi scius, kiel mi vin malamas, se vi scius, ke nun pli ol iam ajn mi deziras vivi, k vivi multe, por oferi tutan mian kapablon, tutan mian energion k tutan mian vivon, por batali kontraŭ vi, por kunhelpi al la de ni, proletoj, konstruenda nova mondo, en kiu ĉiuj homoj estas fratoj, mondo sen landlimoj, sen malamoj ... mondo plena de egalo k justo ... mondo plena de libero k amo, sed amo vera! ..."

Tiel, tiel mi pensadis tiun tagon, kiam ekirante al morto mi trovis la vivon. ... Tiutempe feliĉe mi renkontis esperanton k mi forte kaptis al ĝi same kiel dronanto devas forte kapti al tabulo meze de maro fulmotondra ... Mi metis sur nian karan lingvon tutan mian junan amvarmon; kaj danke ĝi donis al mi plej grandajn ĝojojn, kiujn oni povas ĝui inter tiom da suferoj ... Per esperanto mi renkontis personojn, kiuj estas al mi plej karaj, de mi plej amataj; kaj multaj, malgraŭ la distanco k la ne persona konatiĝo, estas la plej proksimaj al mia koro. ... Al ili ĉiuj, k al ĉiuj vi, proletoj el tuta mondo, koran sennaciecan saluton! ...

... Kaj al vi, Konĉita, mia milda dolĉa Konĉita, — ora revo de mia vivo, adiaŭ por ĉiam ... via memoro k via amata bildo vivos eterne ĉe mi, ĉar kontraŭ la tempo, kontraŭ la distanco k kontraŭ la terura fantomo, mi vin amos ĉiam: ĉar ke mi vin amu silente, sekrete k eĉ nesciate de vi mem, neniu povas al mi bari tion, pro tio ke estante mia, neniam vi estos mia, k pro tio ke al vi mi ŝuldas mian nunan mi, k pro tio ke ne plu mi povas senesperiĝi pri vi; dum mia koro batos, ĝi batos por vi. Sed respondhava vi estas pri tio, kiel pasis, pasas k pasos la tagoj el mia vivo!

R. Kiles (13 661), Valencia.

Menciu nepre esperanton ĉe represigo de artikoloj esper.-devenaj!

Ĉu la Gek-doj ŝatas maldecaĵojn?

Enirinte foiron, kelkaj alkuras la Plej Dikan Virinon aŭ la Pork-homon, aliaj preferas la belaĵojn. Afero de gusto. Same la demando de mi starigita estas ĉefe afero de gusto. Malfeliĉe nur 3 Gek-doj respondis k ĉiuj el sama regiono, tiel ke oni ne ricevas opinion tutmondan.

Ĉar ili ĉiuj priparolis nudon, evidente la vorto „elmontremulo" erarigis la Gek-dojn; per tio mi deziris esprimi specialan nenormalon; tamen ne gravas, unu maldeco malpli! Mi ne kontraŭas nudon, sed ne komprenas, kial oni nomu „kulturo" tian simplan aferon kia estas demeto de l'vestoj. Ke oni nudu, nudadu — ĝisoste — k donu al mi iun tagon la plezuron renkonti nudularon, ĉar mi posedas fortan senton pri la komiko k trovas komika senvestecon en tre artefarita mondo! K-do 14624 sciigas tion, kion li faras en sia ĉambro; kial mi interesiĝu? Ankaŭ tio, kion mi faras, devas esti egale teda demando por la legantoj. Li identigas skribon pri plej intimaj aferoj kun „novaj konceptoj", kio mirigas min, ĉar en la lando de mia edukado, kontraŭe oni lasis tian krudon antaŭ kelkaj jarcentoj. Unu el plej famaj literaturaj maldeculoj estis altranga ekleziulo Sŭift (Swift) el la 17-a jarcento, kies verkoj estas nun nehaveblaj en originala formo (tion mi sciigas *nur* por montri la kontraston laŭ tempo). En Francio, monaĥo de l'16-a jarcento Rable (Rabelais) akiris similan famon. Mi preferas la modernan decon — jen ĉio.

K-dino 1615 rimarkas, „kiel obstine burĝaĉe" mi pensas, sed, ĉar neniuj citaĵoj estis farataj, la diro estas senvalora. Ŝi ankaŭ malkvietas, imagante, ke mi estas avino, samtempe monhava monaĥino (almenaŭ sufiĉe da mon-o!). Sed se *ŝi* estas tro juna por *mi*, kiel mi suspektas, do ŝi rifuĝu en la Junularan Paĝon, kiun afable starigis SAT, ne difininte aĝlimon por aliaj siaj entreprenoj — saĝe, ĉar, ĝis nun ne estis la pli junaj SAT-anoj, kiuj elmontris la iniciativon, novajn ideojn k laborkapablon. Fakte, kelkaj valoras dumvive, aliaj neniam. Tamen, la K-dino povas proponi statut-ŝanĝon por eksterteni ĉiujn el la malŝatataj kategorioj; dume, mi sciigu al ŝi, ke laŭ mia infana sperto en monaĥinejo, la religiulinoj tute *ne* malŝatas maldecaĵojn.

K-dino 2055 volas ne „fanfaroni" pri civilizo, ĉar ĝi estas neperfekta. Videble, ĉar restas ankoraŭ postsignoj de sovaĝaj pratempoj. Tamen, mi trovas ĝin preferinda al sovaĝa stato, aliel mi irus vivi kun sovaĝuloj. Pri la filmoj priskribitaj de ŝi, mi ne kontraŭas, ĉar ĉiu povas decidi por si pri la vidado. En Anglio, antaŭ kelkaj dek jaroj, estis montrata filmo pri sifiliso, estis multe da babilo pri svenoj inter la rigardantoj k aĝlimo de enlasebluloj, k mi dubas, ĉu la filmo efikis aliel, ol por provizi novan sensacion; tamen, la celo estis bona. La K-dino deziras helpi la pederastiulojn. Sed kiel? Per transdono al ili de juna frato, edzo, aŭ amiko? Ili ne bezonas ŝian helpon, opiniante, ke ili superas la seksnormalajn. La studo pri nenormaluloj estas afero por fakuloj; ordinaraj homoj protektu sin! Oni kompreneble ne kulpigu pli ol oni kulpigu frenezulon, sed . . . apartiĝu. Ĉi tie, la atakoj de perfortuloj estas ne maloftaj k ili ŝparas nek geinfanetojn, nek maljunulinojn, ofte mortigante la viktimon post satigo al sia besta egoismo. Kial ni „helpu" tiajn personojn? La K-dino uzas la . . . iom foruzitan kutimon, nomi „faŝisto" tiun, kiu havas malsaman guston. Vere malfeliĉa elekto en ĉi tiu okazo, ĉar la maldeca ago al kontraŭuloj per ricin-oleo de la faŝistoj, montras, ke *mi* ne samideas kun ili!

E.K.L.

KONTRAŬ LA DOGMOJN

La malfortiĝo de l'kredoj.

Kial, en iuj tempoj, la kredoj absorbas la spiriton tiagrade, ke ili ĝin tute superregas, k kial, post pli malpli longa periodo, ili spertas la komunan leĝon, kiu igas la nemateriaĵon, same kiel la materiaĵon, malfortiĝi, poste malaperi?

La observado elmontras, ke la kredoj foruziĝas kun la tempo. Sed por ke ili perdu tute sian prestiĝon super la animoj, devas veni nova kredo, por ilin anstataŭi.

La procezo de tiu ĉi evoluo malkovriĝas ĉiam la sama. La povo de l' kredo, unue tre granda, fine malfortiĝas k malpliiĝas iom post iom ĝis la tago, kiam el la origina kredo transvivas nur la ritoj k la simboloj. Respektata ankoraŭ, la malnova kredo perdis reale sian direktantan influon. Tiam nova kredo povas ĝermi sur la restaĵoj de tiu, kies memoro sole estis vivanta.

La senpoveco de l'racio super la estiĝo k la evoluo de l'kredoj estas notinda, ĉar ĝi permesas ĝustigi kelkajn historiajn iluziojn. Multaj verkistoj restas ankoraŭ konvinkitaj, ke la verkoj de l'filozofoj Volter, Ruso, ktp., skuis la religian kredon en la animo de l' kreduloj ĉirkaŭ la epoko de l'Revolucio. Fakte estas dube, ĉu ĉiuj iliaj volumoj transformis unu solan konvinkiton en skeptikulon. Tiuj ĉi verkoj povis efiki nur sur la animojn, kies ŝajna kredo manifestiĝis nur ankoraŭ per la ekstera praktikado de kulto.

Tiu ĉi psikologia fenomeno pri la eluziĝo de religia kredo helpas al la kompreno, kial estas senutile kontraŭstarigi malnovajn kredojn al politikaj kredoj sufiĉe intensaj por konsistigi religion. La pasintaj kredoj ne rejuniĝas.

La moderna Eŭropo troviĝas ĝuste en unu el tiuj krizaj historiaj epokoj, kiu estas analoga al la komenciĝo de l'kristanismo, kiam la paganismo troviĝis en konflikto kun nova kredo.

Ne havante influon sur la popolajn kredojn, ĉu la racio povus influi sur la homojn sufiĉe instruitajn por analizi sian kredon?

La respondon al tiu ĉi demando havigas la fakto, ke eminentaj scienculoj akceptas ĉiam kiel nediskuteblajn verojn religiajn legendojn, kiujn neniu racio kapablus defendi.

Inter tiuj ĉi scienculoj, kurbigitaj per la pezo de l'kredoj de sia epoko, oni povas citi preskaŭ nur Paskal, kies racio provis diskuti pri la kredo. En tiu ĉi konflikto la kredo venkis. La fama pensulo fine decidiĝis konsideri veraj la religiajn legendojn, kies forton devis foruzi la tempo, sed kiuj, en sia epoko, reprezentis eternajn verojn.

Ĉu religia kredo foruzita de la tempo povas aliiĝi en racian kredon? La historio liveras preskaŭ nur unu solan ekzemplon de tia transformiĝo. Ĝi estas efektivigita de la protestantismo, kiam ĝi akceptis la tielnomatan liberalan formon. En tiu ĉi lasta evoluo de l'kristanismo la koncepto pri Dio, kiu lasas perei sian filon en turmentoj por elaĉeti la pekojn de siaj kreaĵoj, estas komplete malakceptata. Kristo perdis sian dian originon k estas konsiderata nur ankoraŭ kiel simpla moralisto, kiu predikis utilajn verojn. Tiel transformita, la kristanismo ne plu estas, fakte, religio k ne povus respondi al la mistikaj aspiroj de l'animoj turmentataj de la bezono kredi al estonta mondo pli bona.

La plej senbridaj persekutoj ne povus ŝanceli la kredojn. . . . Se la komunistoj estus destinitaj suferi sur iu ajn punkto de l'terglobo la turmentegojn, al kiuj Nerono kondamnis la kristanojn, la komunista kredo sendube spertus disvastiĝon pli rapidan ankoraŭ ol tiun ĉi nuntempan.

*

Oni povas resumi en la sekvantaj tezoj la psikologiajn principojn, kiuj direktas la estiĝon k la malaperon de l'kredoj ĉiuspecaj, religiaj, politikaj aŭ sociaj.

1) La bezono de kredo por orienti la pensojn k la konduton estas tiel urĝega k potenca kiel la malsato k la amo;

2) La homo ŝanĝas iafoje la nomon de siaj dioj, sed la mistikaj influoj, kiuj ĉiam regis lian animon, regas ĝin ankoraŭ;

3) La malnovajn personecajn diaĵojn la moderna homo tendencas anstataŭigi per dogmoj k formuloj, al kiuj estas atribuata la sama magia povo. La parto da vero, kiun entenas tiuj ĉi novaj dogmoj, ĝenerale ne estas pli granda ol tiu de l'malnovaj kredoj;

4) La religiaj kredoj k la politikaj kredoj kun religia formo ne konstruiĝas sur racio k ne povas esti detruataj de l'racio;

5) Per sugestoj, devenantaj de l' prestiĝo, de l'certigo k de l'ripetado fondiĝas la kredoj. La mensa komuniko konsistigas ilian ĉefan propagand-rimedon.

Konklude oni povas diri, ke la influo de l'diaj fantomoj plenigintaj la ĉielon, k tiu de l'iluzioj, kiuj provas anstataŭi ilin nuntempe, montras, ke la nerealo ludas en la historio tiel gravan rolon kiel la realo. Sub ĝia agado grandaj civilizoj ekestiĝis el nenio k aliaj reneniiĝis. La nerealo donis al la homo la iluzion pri eterno de feliĉo, kiun la severa naturo ne konsentis al li. Sen ĝia potenco, la homaro restus droninta en eterna barbareco.

Post jarcentoj da fortostreĉoj la sciencо penetrigis la homon en la ciklon de l'realo, sed la nerealo ankoraŭ superŝutas lin. El la konflikto inter la realo k la nerealo la moderna historio estiĝis. Reganto suverena super niaj ideoj, niaj kredoj k niaj revoj, la nerealo, mi ripetas ĝin ankoraŭfoje, restas unu el la grandaj kreantoj de l'realo.

D-o Gustavo Le Bon
en „Sciencaj bazoj por Histori-filozofio“.
El la franca tradukis Evig.

FABELOJ de Hermynia Zur Mühlen
Kion rakontas la amikoj de Peĉjo
Prezo 0,60 gmk. – 56 pĝ.
Administrejo de SAT,
Colmstraße 1, Leipzig O 27.

TRA ESPERANTIO

La V-a Kongreso de Sveda LEA.

Sveda LEA ĝis nun kongresis nur ĉiun duan jaron. Ĝia kvina kongreso nun okazis en Stokholmo la 25-an k 26-an de julio. Partoprenis 58 delegitoj. Sabate, la 25-an estis malfermata la kongreso per kanto de la miksita ĥoro de Laborista Esp.Klubo en Stokholmo, k post salutvortoj al ĉeestantaj gastoj K-do Adamsson legis la raportojn pri la pasinta agad-periodo, kiuj estis aprobataj post mallonga diskuto.

La plej grava punkto de l'kongrespritraktoj rilatis al la Statutaro de la Sveda LEA. Post vigla diskuto fine dum la dimanĉo la Statutaro estis aprobata post akcepto de kelkaj ŝanĝproponoj faritaj de la Laborista Esp. Klubo en Stokholmo. Interalie la kongreso decidis enmeti en la Statuto alineon pri kunlaboro kun aliaj lingvoregionaj asocioj k kun SAT.

Jam en siaj enkondukaj vortoj K-do Adamsson menciis, ke la centro devus translokiĝi al Stokholmo el Gotenburgo, ĉar pro la skismo inter la du komunistaj tendencoj en Gotenburgo la laboro suferis; k ankaŭ ĉar la movado nuntempe en Stokholmo estas sufiĉe vigla, li pledis por translokiĝo de la centro al la ĉefurbo. La kongreso decidis ankaŭ unuanime elekti K-dojn el Stokholmo en la Ekzekutivan Komitaton, k estis elektataj K-doj E. Eriksson, O. Hj. Olsson k J. Johansson. Kiel ceteraj estraranoj estis nomataj K-doj E. Adamsson, J. Leden, J. Sverker k J. Norberg. Kontrolantoj: K-doj A. Norrman k R. Svensson, ambaŭ el Stokholmo, k kiel redaktoro de la gazeto „Svenska Arbetar-Esperantisten“ estas elektita K-do J. Johansson.

Post la fino de la pritraktoj la kongresantoj ekskursis perŝipe al loko ekster Stokholmo, kie interalie naŭ infanoj de germanaj fervojistoj el Frankfurt-a.M. (gastoj en svedaj familioj) kantis. K-do E. Eriksson fermis la kongreson per dankesprimoj al K-do Adamsson, sur kies ŝultroj ĝis nun kuŝis la laboro.

J. J.

Kunsido de la LEA-oj okaze de la 11-a Kongreso de SAT.

Okaze de la Amsterdama SAT-kongreso kunsidis reprezentantoj k anoj de LEA-oj je la 3-a de aŭgusto vespere en la kongresejo „Brakke Grond“. La kunsidon partoprenis multaj Gek-doj, k laŭalfabete laŭ lingvodistriktoj diversaj Gek-doj raportis pri la stato en la koncerna LEA. Montriĝis el tiuj raportoj, ke la tuta movado suferas pro la interbatalo de diversaj tendencoj k ke la nombro da anoj malkreskis en kelkaj lokoj pro tio. Male la movado en lingvoregionoj, en kiuj la K-doj ne interbatalis, montris bonan staton el ĉiuj vidpunktoj. – En la vigla debato, kiu sekvis post la raportado, partoprenis Gek-doj el Anglio, Aŭstrio, Belgio, Francio, Germanio, Nederlando k Svedio. La kunsidon prezidis K-do Sulski (Londono).

La 2-a laborista Olimpiado – grava sukceso por esperanto.

La olimpiada komisiono de la Aŭstria Labor. Ligo Esperantista (ALLE) jam depost jaro laboris en interkonsento kun la olimpiada sekretariejo preparante la olimpiadon. Ĉiuj varbiloj k flugfolioj havis ankaŭ esp-an tekston, varbafiŝoj grandkvante estis eldonitaj ankaŭ en esp-o k en la interkorespondado ofte esp-o estis uzata praktike.

Dum la Olimpiado mem ALLE instalis *esperanto-informejojn* en la stacidomoj k la olimpiadaj oficejoj, kiuj oftege estis uzataj k bezonataj. Okazis kelkfoje, k fremdlingvano nur per esperanto povis konigi siajn peton aŭ deziron.

En kadro de la festaranĝoj estis aranĝita ankaŭ *internacia esperanto-manifestacio* kun bela programo. Tramista ĥoro esp.-lingve prezentis la „Internacion“, belan ĥoron „Matenvoko“ k la „Kanton de la laboro“. Delegitoj el 14 ŝtatoj salutis la kunvenon. Ege aplaŭditaj estis precipe la angla K-dino k la delegitoj el faŝistaj landoj. Entute estis efektive „interfratiga vespero“ montranta, ke nur komuna mondlingvo povas realigi la ideon de internacio. Ankaŭ en aliaj kunvenoj, ĉu de abstinenculoj, filatelistoj ktp., kelkfoje parolis esp-istaj K-doj.

Finfine okazis la 26-an de julio la impona festmarŝo de la sportuloj preter la delegitoj de la 2-a Internacio al la stadio. 70000 partoprenantoj el 17 nacioj marŝis inter spaliro de 400000 rigardantoj. Kvar horojn daŭris la pretermarŝo. Inter la grupegoj kaj grupoj de la plej diversaj sport-disciplinoj estis ankaŭ la grupo de la Esperantistoj-naturamikoj. Pli ol 150 turiste vestitaj Gek-doj marŝis kantante aŭ parolĥore vokante. Flame flirtis ilia ruĝa flagaro k esperplene brilis la verdaj steloj en ili. Ĉie el la amasa rigardantaro oni aŭdis esp-lingvajn salutvortojn, tiom esp-o jam estas disvastigita. Ĉe ponto, kiun ĉiuj marŝantoj devis transiri, staris la Vienaj lab.esperantistoj per flagoj k afiŝoj salutante la marŝantan sportularon k inter ĉiuj nacioj oni povis rimarki Gek-dojn portantajn la esp-an insignon.

Pliaj detaloj pri la Kongreso de SAT sekvos en venontaj n-oj.

Okazis miraklo!

Ankoraŭ en februaro de tiu ĉi jaro la konsilantaro de la Socialdemokrata Partio Nederlanda en siaj debatoj malgraŭ fervoraj pledantoj por esperanto inklinis aŭskulti laŭ la voĉoj de kelkaj „aŭtoritataj“ membroj, kiuj asertis, ke estas neeble uzi praktike esperanton kiel interkomprenilon tutmondan. Ĝi konklude promesis nur doni „ŝancon“ al nia lingvo en la partia kongreso.

Ankoraŭ ĉe la komenco de la 11-a SAT-kongreso la redakcio de „Het Volk“ (La Popolo), ĉiutaga gazeto de l'socialdem. partio, rifuzis enmeti la raportojn senditajn pri nia kongreso.

Sed — ĉe la 4-a laborkunsido de la kongreso (je 5-a de aŭg. vespere), tiu sama, en kiu la debatoj estis plej viglaj k akraj k degeneris fine en tumulton sekve de la seninterrompa incitado k provokado de opoziciuloj — ĉeestis persone unu redaktoro de „Het Volk“. Kaj jam sekvantan matenon troviĝis ampleksa artikolo en la ĵurnalo, eĉ kun *esperantlingva* titolo: „Nur per praktiko esperanto progresas.“ Interalie ni legas en tiu ĉi artikolo jenon: „... Ĉi tie ne okazis konferenco el instruitaj diplomatoj, sed kongreso el simplaj laboristoj, kiuj preskaŭ ĉiuj nur scipovas du lingvojn, ĉiu unu nacian k ĉiuj kune unu komunan internacian: la mondhelplingvon esperanto! — Kaj kiel estis ĉi tie uzata tiu ĉi lingvo! — Ni volas al ĉiu, kiu ankoraŭ la plej etan dubon sentas kontraŭ la praktika uzeblo de esperanto, insiste konsili, en tiuj ĉi tagoj fari viziton al „De Brakke Grond“[1]. Estas vere nekredeble! ...“

Okazis miraklo...

Varbkonkurso al „S-ulo“.

Ĉiu legis en la lasta n-o la sciigon pri la rezulto k fino de nia Varbkonkurso.[2] Jam ĉe ekstarigo de tiu Konkurso vi sciiĝis, ke la propono por ĝi venis de K-do, kiu samtempe kun la projekto deponis ĉe la Redakcio la mon-sumon necesan por garantii per ĝi la pagon de l'premioj sen ia elspezo por SAT. Nun la iniciatinto rajtigas nin konigi lian nomon en la gazeto: vi do sciu, ke ĉi tiu oferema K-do estas K-do *Soares*.

Refoje ni vokas al ĉiuj fervoraj k varbemaj Gek-doj en la tuta mondo: en nuna momento, post la sukcesplena XI-a Kongreso de SAT en Amsterdamo, pli ol iam ajn certigu la sukcesan antaŭeniron de SAT k de ĝia organo „S-ulo“! La krizo estu likvidita per multobligita k plifortigita varbado de novaj membroj al SAT k novaj abonantoj al „S-ulo“!

[1] La kongresejo. — *Red.*

[2] Aldoniĝas al la publikigitaj listoj jenaj tro malfrue ricevitaj rezultoj:

K-do W. J. Eerdmans, *Rotterdam*, varbis *5 aktivajn* membrojn, K-do St. Lisauskas, *Carfin*, ankoraŭ *2 kvaronjarajn* abonojn al „S-ulo“, K-do A. Teufelsbrucker, *Linz*, ankoraŭ *1 aktivan* membron.

Ĉiu konscia SAT-ano portas la sennaciecan insignon, ne la nacian. Oni ja ne lernas esperanton por interrilati kun samlandanoj. Mendu la SAT-insiguon ĉe la Administracio en Leipzig O 27.

TRA LA MOVADO

ĈE LA NEŬTRALULOJ

La Franca Ligo de Homaj Rajtoj (150. 000 membroj) decidis fari inter siaj sekcioj enketon pri esp-o. En ĝia Bulteno aperis jam 2 favoraj k 1 malfavora artikolo. 9 sekcioj jam voĉdonis favore al esp-o.

La „oficiala“ esperanto-insigno (verda sur blanka fundo) rajtas esti portata de fervojistoj dum deĵora tempo sur la linio Vieno-Aspang (Aŭstrio) laŭ dekreto de la direkcio de 19. 5. 1931.

La prusa Akademio de l'teknikaj artoj k sciencoj subtenas la eldonon de germanlingva verko pri internacia lingvo, kiun aperigas la germana societo de inĝenieroj. Ĝi estas ĉ. 460-paĝa k verkita de s-o Wüster, aŭtoro de la „Enciklopedia Vortaro Esperanta-Germana“. Al la „planlingvoj“ (artefaritaj lingvoj) estas dediĉitaj en ĝi 116 paĝoj.

Je la 26-a de julio estis inaŭgurata en Bulonjo-sur-Maro la placo antaŭ la stacidomo Tintelleries, kie elvagoniĝis d-o Zamenhof en j. 1905, kiel „Placo Zamenhof“. La ceremonion ĉeestis multnombraj esp-istoj diverslandaj.

RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

LEA-Kantaro. Kolekto de proletaj, batalaj, liberpensulaj k popolaj kantoj. Tria reviziita eldono. Eld. GLEA, Berlin C. 25, 1931. Prezo: 0,40 mk. g. 76 pĝ. Form. 10×14½ cm. (Sen musiknotoj).

Oni estas kantema en Germanio. La bezono je malkara kantaro tie ĉiam sentebliĝis pli ol alie. Nia SAT-Kantaro, pli ampleksa k pli kara precipe pro la muziknotoj akompanantaj la kantojn, pro sia prezo ne povis esti akirata senpene de ĉiu lab. kantemulo. Sekve estis pravigebla la eldono de tiu ĉi GLEA-eldonaĵo. Sed ni devas riproĉi al la kompilintoj k protesti, ke plilarĝigante la novan eldonon, ili multajn kantojn *simple elprenis el la SAT-Kantaro*, sen antaŭa interkonsento kun la SAT-kooperativo k ankaŭ sen mencii la fonton, laŭ kiu oni represis!

N. B.

La Unua de Majo. Legolibro por proletaj esperantistoj. Eldonejo: Tettoo-Ŝoin (Eduka Fako de J.P.E.U.). 60 pĝ. Form. 13×19 cm. Pr.: 1 mk. g.

Pri tiu ĉi libreto ni devas fari la saman rimarkon kiel pri la antaŭa: Pluraj ĉapitroj estas represitaj laŭ „S-ulo“ k aliaj SAT-eldonaĵoj, sen interkonsento kun SAT k sen mencio de la fonto! Se ni niaflanke same procedus pri opoziciaj verkoj, ni kredeble aŭdus baldaŭ pri „uzurpo, ŝtelo“ ktp, sed, de kiam CK de SEU donis la signalon, ĉio kontraŭ la bonaj moroj ŝajnas esti permesita al opoziciaj LEA-estraroj. — La libreto estas sufiĉe lerte kompilita; la lingvo estas ĝenerale bona, krom stilaj mankoj. Malbona estas la uzado de „demonstracio“ en senco de *manifestacio* k de la vorto „mitingo“ (amaskunveno).

N. B.

MEMORNOTO

Priesper. artik. k notojn enhavis:

Signalen, Stokh., 30. 7.; *The Labour Woman*, London, aŭg.

Peresper. materialon enpresis:

Le Réveil Ouvrier, Nancy, 29. 7., 1. 8.

Pri SAT-Kongreso raportis:

Het Volk, Amsterdam, 5. 8., 7. 8. — *De Tribune*, la kompartia gazeto aperanta en Amsterdam, enhavis dum la kongrestagoj plurajn malobjektive k insultplene verkitajn kontraŭ-SAT-ajn artikolojn en esp-a k holanda lingvoj.

El SAT-eldonaĵoj represis:

La Juna Socialisto (Leeds) ĉiumonate depost januaro unu ĉapitron el „Fabeloj“ (Herm. Zur Mühlen) en angla trad. laŭ esp. eldono.

NIA POŜTO

16 462. — Ni ricevis vian sendaĵon, sed ĝi estas nesufiĉe afrankita. Vi ŝuldas al la Adm. 0,30 mk. g. *Red.*

17 275. — Jes, ankaŭ pasivaj membroj ricevos jarlibron, kiam ĝi aperos. *Adm.*

KORESPONDADO

Unu enpreso, simpla trilinia anonceto kostas 0,80 mk. g., ĉiu plia linio 0,50 mk. g. — Grandaj anoncoj kun kadro: po kv. cm. kostas 0,20 mk. g.

FRANCIO

Adresŝanĝo. — R. Melo, 30 rue Chemin Vert, *Drancy apud Paris.* — Ĉiam koresp. kĉl, L, PK, PM. Tuj resp. al ĉiuj.

NEDERLANDO

— Maldekstrulo (23 j.), vizitonta bicikle okc. Germanion dez. dum kelkaj tagoj simple gasti ĉe senlabora K-do. Pagos 2 guld. po plentago. Skribu al: K-do S. J. Evenbly, *Scheveningen* (Haag).

Letervespero en Novisad

La Amika Rondo aranĝos la 5. sept. letervesperon, por kiu ĝi petas sendi: L, PK, PI, bfl., gaz. k ekspozmaterialon el ĉ. l., krom Sovetio. Ni ĉion rekompencos. Adr.: Jozefo Vecsey, Nemaĉka ul. 37, *Novisad* (Jugoslavio).

ENHAVO

pağo
Kongresa Parolado . . . . . . 365—366
Gvidrezolucio 366
Letero de Sako el la malliberejo 367
La fonto de senlaboreco . . . 367—369
Sen laboro 368
Tagoj el mia vivo 369
Ĉu la Gek-doj ŝatas maldecaĵojn 370
Kontraŭ la dogmojn 370
Tra Esperantio 371
Recenzejo 372
Korespondado 372

Presejo: Oscar Wettig, Gelnhausen (Germanio)